

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro

PENSO KAJ LABORO POR LA UNIVERSALA FRATECO

DIREKTORO: NELSON PEREIRA DE SOUZA

ĈEFREDAKTORO: LÁSZLO ZINNER

JARABONO

BRAZILO — Cr\$ 20,00
Eksterlande — U\$§ 1,50
Aŭ 15 Respondokuponoj
Ekzemplero — Cr\$ 2,00

RIO DE JANEIRO, FEBRUARO, 1948

JARO II

Monata eldono

N.º 11

Adreso: Caixa Postal 3677

Redakcio kaj Administrejo
Rua das Marrecas, 19, 2.º and
Telefona 22-5300

Parolado de S-ino Cedilha Neto, Okaze de La Enoficigo de La Nova Estraro de Asocio, Je La Unua de Januaro 1948

Laŭ homaj konvencioj, ni eniras en novan ciklon de la tempo. Ĉiu el ni ĝin atendas, ĝoje aŭ malĝoje, laŭ la seniluziigoj aŭ triumfoj de ni spertitaj dum la ĵus finiĝinta jaro. Tiel, esperplenaj unuj, timemaj aliaj, ni rigardas la hodiaŭan ektagiĝon.

“Kion mi faris dum la jaro kiu ĵus finiĝis? Ĉu la tempo vane forpasis por mi aŭ mi bone plenumis ĉiujn miajn devojn?”. Jen la demandoj kiujn ĉiuj seriozaj homoj faras al si mem komence de nova jaro.

Gravaj demandoj kiuj meritas de ni ŝincerajn respondojn, ĉar la voĉo de nia propra konscio diras al ni, ke ĉiuj homoj havas gravan taskon plenumi en la mondo, por la homaro. Bedaŭrinde, ankoraŭ malmultaj inter ni posedas la senton de tiu vero!

Sed mi ne kredas, ke tio okazas al ni, disĉiploj de Zamenhof, la homo kiu ekde sia infaneco tiel efike laboradis kun celo plibonigi la homaron. Pro tio, la plej grava el la demandoj kiuj hodiaŭ agitas la cerbon de ĉiu el ni, esperantistoj, devas esti la jena:

“— Kion mi faris por perfektigi mian esperantan scion kaj kion mi faris, fakte kaj efike, por disvastigi nian idealon de internacia lingvo?”. Se mi faris nenion, mi ne plenumis nian honortaskon — realigi la sanktan profetaĵon de nia karega majstro:

“Ni inter popoloj la murojn [detruos, Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj Ekregos sur tero”.

Sed, por ke “amo kaj vero ekregu sur tero”, ni devas lerni Esperanton kaj ĝin instrui, disvastigante, samtempe, ĝian internan ideon. Kiel lingvo nur, Esperanto neniam sukcesos efektiviĝi tutmondan fratecon; sed feliĉe, ekde sia naskiĝo, ĝi estas io pli ol simpla lingvo. Por ĝia kreinto, la “verda standardo” estis ankaŭ la simbolo de Amo, Vero kaj Justeco. En tiu senco ni aŭdu la signifajn vortojn de Zamenhof, vortojn kiuj li elparolis dum la dua Esperanto-Kongreso:

“Se mi la tutan, pli bonan, parton de mia vivo memvole pasigis en grandaj suferoj kaj oferoj kaj ne rezervis por mi eĉ ian rajton de aŭtoreco — ĉu mi faris tion ĉi pro ia praktika utileco? Se la unuaj esperantistoj paciencie elmetadis sin ne sole al konstanta mokaĉo, sed eĉ al grandaj oferoj, kaj, ekzemple unu malriĉa instruistino longan tempon suferis malsaton, nur por ke ŝi povu ŝpari iom da mono por la propagando de Esperanto — ĉu ili ĉiuj farus tion ĉi pro ia praktika utileco? Se ofte personoj alforĝitaj al la liĝo de morto skribadis al mi, ke Esperanto estas la sola konsolo de ilia finiĝanta vivo, ĉu ili pensis tiam pri la praktika utileco? Ho, ne, ne, ne! Ĉiuj memoris nur pri la interna ideo entenata en la esperantismo; ĉiuj ŝatis Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas reciproke la korpejn de la homoj, eĉ ne tial, ke ĝi alproksimigas la cerbojn de la homoj,

sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliaj korojn”.

Ĉu vi jam pensis pri la lasta celo de nia belsona lingvo? Iam venos la tempo en kiu la nunaj naciaj lingvoj estos lernataj nur de lingvistoj, same kiel nuntempe oni lernas la hebrean, latinan kaj aliajn mortintajn lingvojn. Nur tiamaniere estos detruita la plej granda baro kiu interdividas la popolojn: la lingva baro. Frue aŭ malfrue — tio ja dependas de nia klopodo — tiu estonteco estos realaĵo, kaj tiam ekfloros sur la Tero alia homaro, alia civilizacio, pli perfekta ol tiu, kiun ni konsistigas. Kompare kun ĝi, tio, kion ni hodiaŭe nomas, fierege, “civilizacio de la dudeka jarcento”, estos nur rafinita sovaĝeco! Sed, kiom da tempo ni bezonas por atingi tiun feliĉan epokon? Mi ne scias. Nur la estonteco povos respondi tiun demandon.

Bedaŭrinde, eĉ kiam ni solene kunvenas por propagandi nian idealon kiu estas la paciĝo de la tuta homaro, tiom enkatentitaj ankoraŭ ni estas de niaj superstiĉoj, ke, parolante pri la necesa detruo de la rasaj muroj, mal’ogike ni interplektas nian verdan standardon kun la nacia standardo!

Tiamaniere, neniam ni sukcesos meti pli alten nian Idealon ol niaj antaŭjuĝojn!

Kiam la homaro konvinkiĝos, ke la tiel nomata “patriotisma virto” ĉiam, en siaj plej viglaj fazoj, prezentiĝas per torentoj

el sango, ne plu flugos en la ĉielo tiuj drapaj ĉifonoj kiuj tiom da sovaĝa malpaciĝo enhavas.

Pli plenigitaj je nia Esperanta Idealo ni estos, kiam ni starigos, kune kun la Verda Standardo, nur la mildan blankan standardon kiu simboligas Pacon, nur Pacon!

Sed, por moderigi nian sopiron pri tiu feliĉa estonteco kaj fini nian paroladon, ni rememoru tiujn saĝajn konsilojn de Han Ryner:

“Ni, kiuj deziras, ke la homaro iam sin nutru per la greno de l’ frateco, sciuj, ke ni estas en decembro kaj, ke oni rikoltas nur en aŭgusto.

Ni, kiuj deziras, ke la homoj iam estu kunigitaj en fratecan Paradizon, sciuj, ke grandaj arboj malrapide kreskas kaj ni ne postulu — tuj post la plantado — ke ili donu ombbron al ni.

Miaj karaj geamikoj, ĉiu el ni povas fari ion, ĉiu el ni povas krei en si mem homon tia kiaj ni revas la homojn de la estonteco.

Ke ĉiu el ni realigu tiun taskon kiu, kvankam ŝajne ne multvalora, estas la plej admirinda, la plej meritinda el ĉiuj ĉefverkoj.

Ke ĉiu el ni adaptiĝu kaj fariĝu tia kia li revas la homon de la estonteco. Nur tiamaniere, meze de la malagrablaĵoj kaj malĝojoj de la nuna epoko, ni fondos admirindan oazon de Boneco kaj Amo”.

Esperanto Kaj Radio

Laŭ kion ni anoncis en nia januara n-o, ni ĉi-sube aperigas la paroladon de S-ino D-ro Ilka Duque de Estrada, farita antaŭ la mikrofono de PRA-2 - Radiostacio pri Edukado kaj Saneco, okaze de Zamenhofa — semajno en Rio de Janeiro.

A luta de 15 de dezembro, é, para os esperantistas, particularmente grata, porque foi neste dia, em 1859, na Lituania, que nasceu Zamenhof, o aclarado espírito, o humanista sereno, que deu ao mundo a lingua que a todos os povos há de irmanar.

Há no mundo duas espécies distintas de elocubrações: a das inteligências que se esforçam em elevar o nível da vida, criando novos métodos e novas diretrizes morais e espirituais, capazes de tornarem a humanidade mais feliz; e a das atividades que geram a fortuna com o elevado propósito de, por ela, promoverem o bem estar geral. Uma e outra para atingirem a méta ideal necessitam de paz sobre a terra, e por isso, entre aquelas as que se dedicam a alcançar a paz e a estabelecê-la entre os homens, permanentemente, são de modo indubitável, as mais esclarecidas, as que melhor se orientam. O fácil entendimento entre todos os seres humanos, qualquer que seja sua raça, sua moral, sua educação, sua pecúnia, é um instrumento poderoso de harmonia universal. Falando, todos se entendem, diz a sabedoria popular, mas é preciso que se fale na mesma língua.

Nisso refletiu o alto espírito dêsse precursor admirável, o Dr. L. L. Zamenhof, quando, em mensagem que dirigiu ao Congresso das Raças, realizado em Londres, em 1911, diz: "Nenhum paliativo de compromissos, nenhum sagaz tratado político trará paz à humanidade. Quanto mais, entretanto, o Esperantismo se fortalecer no mundo, quanto mais frequentemente os homens de diversas gentes se reunirem e se relacionarem sobre um fundamento neutro, tanto mais eles se habituarão à compreensão e amor recíproco, tanto mais sentirão que todos têm iguais corações, iguais entendimentos, iguais ideais, iguais sofrimentos e dôres, e que todo o odio entre

as gentes nada mais é do que resquício dos tempos da barbárie. Dêsse fundamento neutro... pouco a pouco surgirá essa futura humanidade, unida e puramente humana, com a qual sonharam os profetas de todas as gentes e de todos os tempos"...

Ao conceber e construir, sábia e pacientemente, um novo idioma que homens nascidos em qualquer latitude ou longitude podem usar com pequeno esforço, êle quiz que se falando, homens de todos os climas se compreendessem, pondo abaixo a barreira da língua de que, não raro, se servem os maus políticos, os fanaticos condutores de povos, dementados por um ismo qualquer, para lançar umas contra outras pacíficas populações que não puderam se entender.

Vejamos, a êste respeito, um postulado do grande pensador: "As verdadeiras muralhas entre as gentes, a verdadeira causa de todo o odio, residem na diferença das línguas e das religiões. Principalmente a língua representa tão grande e quase exclusivo papel na diversidade das gentes, que em alguns idiomas os vocábulos "língua" e "gente" são sinônimos perfeitos. Se dois homens falam a mesma língua, sem humilhação para qualquer deles, com iguais direitos sobre ela, e graças a ela, não somente se compreendem um ao outro, mas possuem a mesma literatura (oral ou escrita), a mesma educação, os mesmos ideais, a mesma dignidade humana e os mesmos direitos; se, além disso, eles têm o mesmo Deus, as mesmas festas, os mesmos costumes, tradições e modo de viver, sentem-se absolutamente irmãos, sentem que pertencem à mesma gente. Se dois homens não compreendem um ao outro, se, outrossim, possuem costumes e modos de viver de todo diversos, olham-se como estranhos, quais mudos e bárbaros, instintivamente se evitam e desconfiam um do outro, da mesma sorte que instintivamente desconfiamos de tudo quanto aos nossos olhos se oculta nas trevas".

Servia êle a um alto ideal de paz no dia em que deu ao mundo o Esperanto e nos dias infinitos que dedicou à propaganda,

com o fervor de um apóstolo, sofrendo como todos os iluminados, a púa acerrada da incompreensão e da indiferença.

Mas o humanismo de Zamenhof culminou no Deklaracio pri Homaranismo (Profissão de Fé Humanitária), onde êle nos legou a sua doutrina social, definida pelo Plena Vortaro, assim: "doutrina que exige que cada homem encare e ame como seus irmão os homens de todas as pátrias".

Os pontos básicos da Declaração são os seguintes: "Eu sou um ser humano e considero toda a humanidade como uma só família. A divisão da humanidade em diversas raças que se hostilizam reciprocamente e em seitas raciais, é uma das maiores desgraças que mais cedo ou mais tarde terá que desaparecer e para cujo desaparecimento devo empregar todo o meu poder".

"Vejo em cada ser humano somente um ser humano e classifico cada ser humano pelo seu valor pessoal e pelas suas ações. Toda ofensa ou opressão a um ser humano por pertencer êle a outra raça, a outra língua, ou a outra classe social que não sejam as minhas, eu reputo uma barbaridade".

Em sua doutrina humanitária Zamenhof revela o seu misticismo, como se vê neste trecho, onde cultua "a Força Misteriosa", "a mais alta Força" "que é a causa das causas": "Sinto que a essência dos verdadeiros mandamentos religiosos reside no coração de todo o homem sob forma de consciência e que o primeiro princípio dêsses mandamentos, obrigatórios para todos, é: procedei para com outrem da mesma sorte que desejaríeis que outrem procedesse convosco".

Eis, ligeiramente evocado o vulto dêsse grande homem cuja memória é reverenciada hoje pelos que guardaram a palavra do Mestre e para os quais o Esperanto tornou-se qual religião que procuram propagar por todos os cantos do globo, trabalhando para que continue aceso o espírito do esperantismo, numa luta de verdadeiros Cruzados, vigilantes da glória de seu fundador.

Comemorando como uma das grandes datas da humanidade, o dia do nascimento de Zamenhof

AOS ASSOCIADOS CORRESPONDENTES

A Diretoria da A.E.R.J. comunica a todos os associados correspondentes, isto é, os que residem no interior do país, que a sua cota foi fixada, em assembléia geral, na quantia de Cr\$ 30,00 anuais, sem filiação na B. L. E. e U. E. A., que ficará a cargo de cada um. Solicitamos, pois, que as remessas sejam feitas ao Tesoureiro, sr. Manoel Barbosa de Mello, o mais breve possível.

GINÁSTICA PELO RÁDIO

Todos os dias úteis, às 6,15 e às 7,30 horas da manhã, o professor Oswaldo Diniz Magalhães transmite, pela Rádio Globo, as duas aulas da sua "Hora da Ginástica", programa que vem sendo apresentado, há mais de 15 anos consecutivos, com grande aproveitamento para adultos e menores de ambos os sexos. Entre uma aula e outra, às 7 horas, aquele educador oferece aos seus inúmeros ouvintes, um bem organizado "Suplemento" educativo, focalizando a volumosa correspondência dos seus alunos, além de aspectos de higiene, moral, civismo e outros assuntos de palpante interesse.

F A R I G U S U B T E N A N T O D E "RIO ESPERANTISTA"

que, ao lado da compreensão que a piedade inspira (a língua em que a todos fala Jesus), dotou os homens da faculdade de falar uma só língua, tanto nas horas de sofrimento, como nas de alegria, na desgraça e na ventura, os esperantistas de todo o mundo, milhares de indivíduos, numa comunhão perfeita, prestam hoje o seu tributo de gratidão àquele que — inteligência e espírito tutelares — apontou o caminho da paz a todas as criaturas de boa vontade, na ânsia de um mundo melhor habitado por uma humanidade perfeita.

NOVA DIREKTORARO DE A. E. R. J.

Je la 1.^a le Januaro 1948 en la ejo de Asocio oni enoficigis la novelektitajn estrojn de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro. Jen la nomoj:

Prezidanto — D. Pereira de Souza.

Generala Sekretario — D-ro Braz Cosenza.

Unua Sekretario — O. S. Lopes.

Dua Sekretario — S-ino Cedilha Netto.

Kasisto — Manoel Barbosa de Mello.

Helpkasisto — F-ino Elza T. Faria.

Bibliotekisto — José Cosenza.

Dum la enoficiga festo, faris paroladetojn la jenaj geanoj: Doblas Filho la prezidinto, Pereira de Souza la nova prezidanto kaj Laszlo Zimmer pri RIO ESPERANTISTA. S-ino Cedilha Netto laŭlegis sian verkon pri "Nova Jaro", José Cosenza deklamis Zamenhofan poemon, O. S. Lopes en portugala lingvo rememoris pri la "Universala Frateco". Ceestis ankaŭ S-ano Arnaldo Viana el S. Paulo, kaj Prof. Ismael Gomes Braga, vic-prezidanto de B. L. E.

Jen eliraĵo el la parolado de la nova prezidanto.

"Jen denove mi ricevas la prezidantecon de nia Asocio. Kiam mi ĝin forlasis, antaŭ du jaroj, en tiu sama dato, mi pensis neniam plu reveni al ĉi tiu posteno, por tio, ke aliaj samideanoj havu la saman oportunecon gvidadi nian karan Asocion; sed mi eraris kaj hodiaŭ mi devas obei vian opinion kaj vian ordonon.

Nun mi estas antaŭ vi, kaj mi devas skizi al vi la programon de la nova estraro de la Asocio. Unue mi diros al vi, ke mi sola povas fari nenion, nur ni ĉiuj kune faros multegon por nia kara Asocio kaj por la Esperanto-movado. Tial mi atendas grandegan laboradon de la Direktoroj, kaj la helpo de ĉiuj samideanoj, dum la tuta jaro.

En la komenciganta jaro ne okazos gravaj novaĵoj. La vivo de la Asocio daŭros tute nature, kaj la programo estos la sama de la hieraŭ fininta jaro. Nur malgrandetajn ŝanĝojn mi intencas fari, kaj mi prezentos la ideon unue al vi, kaj poste al la estraro, por aprobo aŭ malaprobo.

La kulturkunveno daŭre oka-

zos, sed nur dufoje en la monato, gvidataj de s-ano Zimmer. Ili estas bonega programo por la praktikado de nia lingvo. Ni povas okazigi unu lunĉon monate en la ejo, kaj ĝi povas havigi monon al la Asocio. Ĉiu samideano anstataŭ elspezi monon por lunĉi en kafejo, elspezos ĝin en la ejo por helpi la Asocion.

La lastaj ekskursoj havis multe da partoprenantoj, sed mi atendas la plivigligon de la intereso ĉe niaj anoj al ili. Tial ni okazigos nur unu en la monato; dum la somero al marbordoj, kaj dum la vintro al montoj kaj arbaroj. Ilin prizorgos samideano Lopes.

La artfestoj okazos post unu aŭ du monatoj, laŭeble, kaj ni prezentos al vi bonajn artistojn, kiel ĝis nun. Sed estas malfacilaĵo, ĉar ĉiu festo devigas la Asocion elspezi iom da mono, 200 ĝis 500 kruzejoj. Ĉu vi konsentas pagi la enirbileton? Tiamanieri ni povos facile pagi la elspezojn.

La perfektiga kurso haltis dum la lastaj monatoj, sed ĝin ni tuj rekomencigos, kaj la prezidanto mem prizorgos pri ĝi. Gvidi kursojn por komencantoj deziras multaj samideanoj, kiuj bezonas praktiki la lingvon, kaj al ili ni ebligos tion.

Multajn kampanjojn ni devas okazigi, kelkaj dum la tuta jaro, aliaj dum mallonga periodo, ĉar la ankotizoj ne sufiĉas por la elspezo de A.E.R.J.

Tutjaraj estos la disvendado kaj havigo de abonantoj al RIO ESPERANTISTA. Tamen, ambaŭ ne donas profiton, ĉar la gazeto estas vendata je la sama prezo, kiun ĝi kostas al ni. Por ĝia subteno ni bezonas la monhelpon de ĉiu esperantisto, kaj ni petas al ĉiu pagi akurate la kotizojn.

Gravan propon faris antaŭ ne longe samideanino, F-ino Yolanda de Araujo Costa, pri organo de servo por helpo al malsantaj esperantistoj en Eŭropo. Multaj estas la petoj ricevitaj el pluraj landoj, kaj ni jam sendis kion eble. Nun, se vi alportos al ia citita samideanino uzitajn vestojn, ŝuojn, k. a., ni povos pli multe helpi la eŭropajn samideanojn.

Fine, mi diziras al vi ĉiuj, kaj al viaj familianoj: Sanon. Felixon kaj Prosperon dum la jaro 1948^a, kaj atendas vian sindonnan laboradon por nia sankta afero.

NIAJ KULTURKUNVENOJ

La kultura fako de la Asocio okazigis la jenajn kulturkunvenojn dum la monato januaro:

Je la 10-a de januaro la kunvenon lerte gvidis F-ino Maria Angélica de Oliveira dum kiu F-ino Elza Travassos da Faria laŭlegis poeziaĵon "La Kanto de l' Tamojo" verkita de brazila poeto Gonçalves Dias kaj tradukita de S-ano Melo e Souza. S-ano Florestan deklamis la "Tri Gutoj" de Coelho Neto, esperantigita de S-ro João Avellar. Pri la deveno de Esperanto interesiĝe preparolis S-ano Délio Pereira de Souza kaj S-ano Blasĉikov konatigis al la ĉeestantoj kelkajn aspektojn de prinetmpo en Eŭropo. Fine, S-ano Peixoto el urbo Niteroj sciigis la kunvenintojn pri la renaskiĝo de nia movado en tiu urbo. Spite la varmego, ĉeestis sufiĉe da samideanoj.

La 17-an de januaro gvidis la kunvenon S-ano Délio Pereira de Souza. S-ano Zimmer laŭlegis artikolon el la germana esp. gazeto "Komuniko" titolita "La germanaj esperantistoj kaj iliaj rilatoj al Esperantujo". Pri tia aktuala temo okazis ĝenerala debato el kiu, bedaŭrinde, ne estas eble defini la ĝeneralan opinion pro ĝia ekstrema malsameco.

La 24-an de januaro la kunveno estis gvidata de S-ano Doblas Filho. Komence S-ano Blasĉikov laŭlegis elĉerpajon el la libro "La Pacanatomio" verkita de S-ro Emery kiun ni aperigos en RIO ESPERANTISTA. S-ano Zimmer longe paroladis pri "Sankta Fajro". Li komparis la vivon de la artistoj al tiu de la esperantistoj-pioniroj kaj gvidantoj kiuj sindone dediĉas siajn ekzistojn al la venko de iliaj idealoj, ĉu en pliperfektigo de scia arto ĉu en pliperfektigo de la homaro... Li citis ekzemplojn kaj parolis pri vivo de pamkonata franca pentristo Paulo Gougin. Fine de la kunveno, la gitaristo invitita, S-ro Solon Ayala, plezurigis la kunvenintojn ludinte kelkajn muzikaĵojn el kiuj la plej aplaudita estis la "Ave-

Maria" de Schubert. Aparte ni presigas raporton pri la artisto.

La lastan kunvenon de la monato, la 31-an de januaro, gvidis s-ano Blasĉikov laŭ kies propono la kunvenintoj restis dum unu minuto silentaj je la honorigo kaj omaĝo de granda idealisto Mahatma Gandhi ĵus mortigita. S-ano Blasĉikov post tiu omaĝo laŭlegis la rakonton "Pura Blanka Ĉemizoj" de Verner Von Heidenstam el la Sveda Antologio. S-ano Délio Pereira de Souza parolis pri M o h a n d a s Karamachand Gandhi kaj donis mallongan skizon pri la vivo de tiu mondkonata pacbatalanto.

PERFEKTIGA KURSO

Denove funkcias en la ejo, ĉe strato Marrecas, 19, 2-a etaĝo, la perfektiga kurso, gvidata de S-ano Délio Pereira de Souza. Estas, kompreneble, multaj esperantistoj kiuj deziras partopreni la kurson kiuj ankoraŭ ne enskribiĝis. Ni do invitas tiujn samideanojn interkonsenti kun la instruanto kiu ĉiuvespere, post la 6-a kaj duono, estas en la ejo. Se estos sufiĉe granda nombro da samideanoj interesataj pri la kurso, ni povos okazigi alian lecionon en alia tago de la semajno. La kurso ĝis nun funkcias ĉiumerkrede je la 20-a horo.

DEZIRAS KORESPONDI

HUNGARUJO. — S-ro Miklos Lengyel, Budapest I. Baross u-47, I em kun fakuloj kaj interesataj pri konserv- kaj alkoholtrink produktaĵoj.

S-ro Borocz Stefano, Budapest VI. Vilma K.u-22 deziras gekorespondantojn por siaj gelernantoj. Skribu multnombro.

S-ino Béla Barrois, Pécs, Hungaryadi ut 14, deziras korespondi kun brazilanoj. Nepre respondos.

S-ro Mátray Hihály, Debrecen, Eçyletkert ut 18, intersangas poŝtmarkojn.

USONO. — S-ro Conrad Fischer. R.F.D.I., Meadville, Pa. Korespondos kun seriozaj poŝtmarkkolektantoj. Certe respondos.

TRA LA MONDO

BOLIVIO — El letero ricevita de S-ro Jozefo Joels kaj laŭtleĝita de li al la kunvenintaj anoj de AERJ, ni eksciis la ĝojan novaĵon pri la fondiĝo de la Centro Esperantista de Cochabamba. En tiu grava bolivia urbo, kie regas eterna printempo, jam pli ol 30 fervoraj samideanoj estas farantaj viglan por-Esperantan laboron. Kaj ni jam povas antaŭvidi, ke, danke al la aplaŭdinda agado de la koĉabambaj samideanoj, baldaŭ fondiĝos esperantistaj kluboj ankaŭ en aliaj tiulandaj urboj.

La Centro Esperantista de Cochabamba estas fondita kaj prezidata de S-ro Gregorio Kushner, malnova amiko kaj iama lernanto de S-ro Jozefo Joels, kaj el lia letero ni ekscias ankaŭ pri la propaganda agado de S-ro Tibor Sekelj, kiu helpis organizi la nov-fonditan C.E.C.

Nova letero de S-ro Kushner enhavas tamen alian sciigon, kiu vere afliktas nin ĉiujn: Sur aldonita eltranĉaĵo el bolivia gazeto ni vidas telegramon el Trinidad pri la malapero de S-ano Tibor Sekelj en la praarbara regiono, kiun li estis esploranta. Ni esperas, ke pluaj sciigoj el Bolivio trankviligos rilate al la sorto de la fama esploristo kaj ke, viva kaj sana, li jam estas ĉi-tage reveninta al la civilizita mondo kaj al la esperantista agado.

Al S-ro Gregorio Kushner kaj al ĉiuj ceteraj samideanoj el Cochabamba ni sendas varman esperantistan saluton kaj al la Centro Esperantista de Cochabamba, la unua E-organizaĵo en Bolivio, ni deziras longan kaj prosperan ekzistadon kaj fruktedonan agadon.

La adreso de la Centro Esperantista de Cochabamba estas: Casilla Postal N.º 562, Cochabamba, Bolivio.

En lasthore ricevitaj boliviaj gazetoj ("LA PATRIA", el Oruro, n-roj de 20a, 21a kaj 23a de januaro ĵus pasinta, kaj "DIARIO DE LA MAÑANA", ankaŭ el Oruro, n-ro de la 20a de januaro), estas publikigitaj longaj intervjuoj donitaj de nia fervora samideano, S-ro Gregorio Kushner Smith, al la reprezentantoj de tiuj ĉi periodaĵoj, pri Esperanto kaj pri nia Movado.

S-ro Kushner Smith estas nun faranta propagandecelan vojaĝon tra la tuta lando, farante, en ĉiuj gravaj boliviaj urboj, publikajn paroladojn, kiuj estas ankaŭ disaŭditaj de la lokaj radio-stacioj. Pri la bonaj rezultatoj de lia aplaŭdinda agado, ni jam havas jenan grand signifan pruvon: en la urbo Ururo ĵus fondiĝis granda organizaĵo, la Centro Esperantista de Oruro, kies prezidanto estas S-ro Ricardo López Rosse kaj ĝenerala sekretario — prof. Julio Espinoza. La adreso de tiu ĉi novfondita organizaĵo estas: Centro Esperantista de Oruro, Casilla Postal 286, Oruro, Bolivio.

La redaktoroj de RIO ESPERANTISTA kaj la Estraro de la Asocio Esperantista de Rio de Janeiro varme salutas niajn novajn samideanojn, anojn de la Centro Esperantista de Oruro kaj deziras al tiu ĉi organizaĵo plejan disvolvigon. Al la senlaca propagandisto, S-ro Kushner Smith, pri kies projektata vizito al nia lando ni ĵus eksciis kaj estas tre ĝojigitaj, ni sendas niajn gratulojn pro lia sukceso en Oruro.

* * *

VENEZUELO — Ni ricevis la jenan sciigon el Caracas: Fondiĝis "Caracas Esperanto Asocio", je la 2-a de februaro 1948. Dum la fondiĝ-kunveno ĉeestis 20 gesami-

deanoj. 30 aliaj personoj sin prezentis por lerni Esperanton. Dum la kunveno faris paroladon S-ino Ágnes Magyar, hungara esperantistino pri sia aventurplena vojaĝo de Hungarujo al Venezuelo.

Jen la nomoj de la unuaj estranoj de la Asocio: Prezidanto S-ro Benito Losada, Vic-prezidanto: S-ro Alberto Diaz Chapartegui, Sekretario: S-ro Feliz Angel Losada, 2-asekretario: S-ro Lino Muline, Kasisto: S-ro José Maria Sabral, konsilantaro: D-ro Tulio Villalobos, S-ino Agnes Magyar, kaj S-ro Cesar Manzano.

Korespondadreso: Librejo SUMA, — Sabana Grande — Caracas, Venezuelo. La nova Asocio danke akceptas esperantajn sendaĵojn, el ĉiuj eblaj landoj. Ili ja ne havas sufiĉajn propagandajojn. Ĉu gazetojn, ĉu librojn, ĉu broŝurojn.

RIO ESPERANTISTA kore gratulas al la novaj Pioniroj dezirante planan sukceson.

* * *

ĈILO. — Samideanoj en Santiago, pro ilia klopodado pri nia afero, atingis rimarkindan sukceson. Esperanto jam estas instruata en du ŝtataj lernejoj. S-ano René Garcia kaj Prof-oro Rabanales bone sukcesis fari kontrakton pri instruado de Esperanto dum la Someraj Kursoj kiuj komenciĝas en januaro de ĉi tiu jaro ĉe la Centra Universitato. Sendu gratulleterojn al S-ro Anibal Bascunán, Direktoro de Las Escuelas de Temporada, Universidad de Chile, Santiago Ĉilo.

* * *

URUGVAJO. — La kongreso de la instruistoj en tiu najbara lando adoptis rezolucion rekomdante la instruadon de Esperanto en la lernejoj.

* * *

MEKSIKIO. — La konata gazeto "Renovigo", bedaŭrinde, ne plu aperos. La motivo estas; malsaneco de ĝia sindona direktoro kiu eldonis la gazeton dum 11 jaroj sen ia ajn subteno aŭ helpo. Nur kelkaj amikoj helpis al li kaj liaj abonantoj. Espereble baldaŭ resaniĝos nia samideano kaj daŭrigos sian poresperantan laboradon!

* * *

FRANCUJO. — Dum la monato oktobro, 1947, en Parizo, 60 esperantistoj-fervojistoj el Nederlando recipokis la viziton faritan dum la lasta majo de francaj esperantistoj-fervojistoj al Amsterdam. La feston ĉeestis la reprezentanto de la nederlanda ambasadoro.

* * *

HUNGARUJO. — Okaze de la jubilea festkunveno de la Hungarlanda Esperanto-Societo, impone aranĝita en la Muzeo-Halo de la Parlamento, la vicprezidantino de la Parlamento, social-demokratino Kéthly Anna kiu nun festas 25-jaran socialdemokrat-laboron, alparolis la ĉeestantojn pri la grava rolo de Esperanto en la sociala vivo. Prezidanto de H. E. S., Prof. Kókény, parolis pri la viktimoj en Esperanto-Movado faritaj de faŝismo. Parolis ankaŭ Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay.

* * *

SVEDUJO. — Komunistema Frakcio de S.A.T. de nove funkcias. Informoj riceveblaj ĉe S-ano Elis Johansson. BORAS. BERGSBOGATAN 20.

CLUBE ESPERANTISTA "VICENTE DE CARVALHO"

Foi inaugurado no dia 28 de dezembro p.d., por um punhado de esperantistas, animados pelo incansável samideano Cap. José Francisco de Lima, o Clube Esperantista "Vicente de Carvalho".

Vicente de Carvalho foi um notável poeta brasileiro e é o nome de uma estação da E. F. Rio Douro, não muito distante do centro urbano, ao qual está ligada também pela E. F. Central do Brasil, por intermédio de Madureira, e pela E. F. Leopoldina, pela estação da Penha. O Clube está sediado na rua Abagerú n.º 137, numa vila nova e elegante, construída pela Cia. Kosmos: Vila Florença.

Compareceram alguns diretores da A. E. R. J., que fôra convidada para a sessão inaugural. Aberta a sessão pelo Cap. Lima, foi dada a palavra ao sam. D. Pereira de Souza, que em breve oração, enalteceu o trabalho que certamente fará o Clube, não só disseminando o Esperanto no bairro, como trazendo novos batalhadores para o movimento esperantista na cidade.

Falaram ainda outros oradores, que relevaram o valor da iniciativa, que deve ser seguida, até que se tenha um clube em cada bairro da cidade.

A primeira diretoria, aclamada durante a sessão, ficou assim constituída: Presidente: Prof. Ariné da Costa Moraes Rêgo; Secretário: Prof. Victoria Regia de Lima; Tesoureiro: Sr. Aurelio Cesar dos Santos.

Ao Clube os nossos parabens e votos de constante progresso.

Ni ricevis kaj plezure registras la jenan leteron:

*P. O. Solwezi N. Rhodesia.
La 7-an de novembro, 1947.*

Estimataj samideanoj,

Mi ricevis kun granda intereso du ekzemplerojn de RIO ESPERANTISTA. Ĝi precipe plaĉas al mi pro tio, ke mi scipovas legi Esperanton kaj portugalan lingvon. Mi gratulas vin pro belaspekta, interesplena gazeto.

Mi volas komenti pri artikolo kiun mi legis en septembra numero pri "Papiamento-lingvo de Curaçau". Via aŭtoro skribas ion pri lingvoj de Sud-Afriko kaj ĉar mi mem loĝas en proksima lando kie la situacio estas la sama, mi volus korekti kaj klarigi iomete tion kion li asertas.

Unue: Transvaal estas nur parto de Sud-Afriko. Due: "afrikaans" estas parolata ĉie en Sud-Afriko; ĉi tiu lingvo kaj la angla estas ambaŭ oficialaj lingvoj de Sud-Afriko. Ĝi estas gepatra lingvo nur de Eŭropanoj. Ĝi ne esta lingvaĉo, sed havas la saman pozicion rilate al la parenca nederlanda kiel la portugala de Brazilo rilate al portugala de Portugalujo, kiel la hispana de Argentino rilate al hispana de Hispanujo, kiel la angla de Ameriko al angla de Anglujo — krom tio; la influo de la angla okazigis en ĝi simpligon de la gramatikaj formoj.

Pri la indiĝenaj lingvoj mi devas atentigi vin, ke ili tute ne estas nek "krudaj" nek enhavas "malgrandegajn vortarojn", kiel pensas via korespondanto. Ili havas komplikajn sed logikajn gramatikajn strukturon kaj tre grandan vortaron. Certe al ili mankas multaj vortoj por priskribi eŭropan aferojn sed komence ili havas multajn vortojn de indiĝena vivo kiuj tute ne troviĝas en eŭropaj lingvoj. Plue, ili estas tre riĉaj je idiotismoj kaj proverboj kies lernado bezonas longan restadon en Afriko.

Se vi volas, mi sendos al vi pli detalan priskribon de tiuj lingvoj ĉar mi devas uzi unu el ili ĉiutage. La lernantaro kiun mi instruas ĉi tie estas tute indiĝena; "bantu'a". Plaĉos al mi se vi presigos almenaŭ parton de ĉi tiu letero kaj sendos al mi ekzempleron de gazeto.

Via tre sincere,

John L. Wright.

NOVAJ KOTIZOJ

Al ĉiuj anoj, kiuj dum la pasinta jaro ricevis la Jarlibron kaj la revuon Esperanto, ni sciigas, ke pro la plialtigo de la kotizoj de U.E.A. ni estas devigataj plialtigi ankaŭ la niajn. Tial, dum la nuna jaro, la monata kotizo por la anoj de la kategorioj MJ kaj MA estos, respektive, Kr\$ 10,00 kaj Kr\$ 20,00. Por la anoj de la simpla kategorio la kotizo restas senŝanĝa.

La Estraro.

PUBLIKIGAĴOJ RICEVITAĴ

HEROLDO DE ESPERANTO, n-roj 18 kaj 19. Bruselo, Belgujo.

SUDA STELO, n-ro 5, Pôrto Alegre, Brazilo.

VIENA GAZETO, n-ro 2. Viena, Aŭstrujo.

LA PONTO, n-roj 1-2, Munchen-Pasing, Germanujo.

KOMUNIKOJ, n-roj 4 kaj 5. Hannover, Germanujo.

O REVELADOR, n-ro 9. São Paulo.

LABORISTA ESPERANTISTO, n-ro 12. Amsterdam, Nederlando.

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA, (bulteno) n-ro 7. Bruselo, Belgujo.

LA INTERLIGILO, n-roj 7 kaj 8. Parizo, Francujo.

NATURA, (kun esp. fako) n-ro 49. Lisbono, Portugalujo.

S.A.T. AMIKARO, n-roj 37 kaj 38. Parizo, Francujo.

FLANDRA ESPERANTISTO, n-ro 12. Bruselo, Belgujo.

CLUB EXCURSIONISTA DE RAMOS, n-ro 4. Rio de Janeiro, Brazilo.

LA FOLIO, n-ro 10. Malknò, Svedujo.

RESENHA MEDICA, n-ro 5. Rio de Janeiro, Brazilo.

LA MILITREZISTANTO, n-roj 49 kaj 50. Enfield Middlesex. Anglujo.

ESPERANTISTA, n-ro 9. Praga, Ĉeĥoslovakujo.

ANONCO.

La 21-a S.A.T. Kongreso, kiu okazos en Amsterdam dum la kuranta jaro, eldonis esperantokalendaron por subteni la koston de la O.K.K. La prezo estas po unu respondkupono. Tiu ĉi kalendaro estas akirebla ĉe la kasisto S-ro B. BULTEMEYER, JAN VAN GALENSTRAAT 86. I Amsterdam (W) Nederlando.

ESPERANTA MURKALENDARO

Ĉiamdaŭra, luksa, el bona ligno kaj kartono, laŭ la formato 30 x 20 centimetroj. — Prezo: Cr\$ 40,00.

Mendoj al ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO RIO DE JANEIRO, Caixa Postal 3677, Rio de Janeiro, Brazilo.

A. S. REZENDE

— Inĝeniero —

projektoj kaj antaŭkalkuloj por loĝdomoj, luksaj, hoteloj, hospitaloj, lernejoj, kaj aliaj konstruaĵoj.

Informpetoj en lingvoj portugala, franca, angla kaj Esperanta

Adreso: Caixa Postal 2917

Rio de Janeiro

Brazilo

Lastaj Novajoj

Gesinjoroj Bela Vass, niaj abonantoj en São Paulo, festis, la 3-an de decembro, 1947, ilian 25-jaran geelziĝ-datrevenon. Ni kore ilin gratulas.

Trovigas inter ni S-ro José Bonifácio Leite, samideano el Mossoró, ŝtato Rio Grande do Norte. Li restados definitive en Rio de Janeiro. Bonvenon.

"*O Estado*", tagjurnalo en urbo Florianópolis, aperigis grandan artikolon pri la 5-jara datreveno de la Klubo Esperantista en tiu urbo. Ni kore gratulas la gvidantojn.

"*O Albor*", tagjurnalo en urbo Laguna, ŝtato Sankta Katarina, aperigis artikolon pri sukcesa poresperanta laborado de nia samideano, S-ro Francisco Coelho.

"*Brasil Policial*", polica revuo en ĉefurbo brazila, aperigis longan artikolon pri Esperanto en la internacia polica vivo. Ĝin verkis nia kunlaboranto, S-ro Octaviano Lopes.

Samideanoj F. Doblás Filho kaj O. Lopes suferis aŭtoakcidenton la 17-an de februaro. Felice la vundoj estas malgravaj kaj ambaŭ samideanoj jam reedaŭras ilian laboradon.

Fraŭlino Yolanda Araujo de Costa, nia fervora animo, libertempas en Alto Rio Doce, ŝtato Minas Gerais.

Fraŭlino Rosa Lifschitz, la konata alpinistino kaj animo de nia Asocio, revenis de sia ekskursio farita sur al altaj montoj de Brazilo.

BAGATELO

Se malbena de ĉagreno senaverte trafas vin, ho, ne ĝemu, ne blasfemu, ĉar ĝin certe sekvos fin'!

Sed ne ridu kaj ne fidu al konstanta sortograc', ĉar ĝi pasos kaj vin lasos nur en vanta vivo-lac'!

Ĉar en stulta senrezulta kaj tempesta viv' sen cel', ĝojo, rido... plor', perfido... ĉio estas bagatel'!

Eugeniusz Matwiejczuk.

ESPERANTO VENKAS

LA INTERNACIA FOIRO DE LYON, Francujo, uzas Esperanton por sia propagando en la komercaj medioj. S-ano Richar Levin estas organizanta, pere de ĝi, la internaciigon de la franca asocio Esperanto & Komercio. (Adreso: S-ro Richard Levin, Rue Méiétrier, Lyon, Francujo).

LA ESPERANTO-GRUPO EN HANNOVER klopodadas enkonduki Esperanton en la Eksport - Foiron okazontan dum Aprilo en tiu urbo. Ĉiuj esperantistoj estas petataj skribi al ĝi en Esperanto, por fari pli grandan propagandon de nia lingvo. (Adreso: Eksport-Foiro de Hannover, (20a) Hannover - Laatzen, Niedersachsen, Germanujo).

RIO-ESPERANTISTA
Propriedade da A.E.R.J.
Um jornal do Rio para o mundo

Enderêço: Caixa Postal 3677
Rio de Janeiro — Brasil
Redação e administração:
Rua das Marrecas, 19-2.º
Tel. 22-5300

Diretor responsável
Nelson Pereira de Souza

Gerente

F. Doblás Filho

Redator-chefe

László Zinner

Redatores

Konstanteno Blaščikov
D-ro Braz Cosenza
Wilton Ribeiro

*

EXPEDIENTE:

As importâncias referentes às assinaturas de RIO ESPERANTISTA, deverão vir em nome do nosso gerente, sr. F. Doblás Filho, bem como quaisquer quantias, vales-postais, cheques, etc.

*

La gazeto rajtigas tutan liberon al ĝiaj kunlaborantoj kaj ĝi ne respondecas pro la enmetitaj konceptoj en artikoloj subskribitaj.

Estas permesata la represo de la artikoloj, ĉu parte, ĉu tute — kondiĉe, ke oni citu la fonton.

NATURISMO — Compro revistas, albuns de nudismo. Tratar com Gurjão pelo telefone 43-2447, das 12 às 17,30 horas.

Ofereça a seu amigo um bom presente: uma assinatura de:

RIO ESPERANTISTA

DÔR • RESFRIADOS
GUARAINA
NÃO ATACA O CORAÇÃO
UM PRODUTO • RAUL LEITE •

SCHIGOJ DE LA REDAKCIO

AL MULTAJ GESAMIDEANOJ. Konstante ni ricevas diversspecajn kunlaboraĵojn senditaj de brazilaj kaj eksterlandaj samideanoj. Pro neebleco aperigi ilin ĉiuj samtempe, ni iom post iom publikigos la taŭgajn artikolojn, la netaŭgajn ni resendos al la aŭtoroj. Havu do paciencon!

PRI INFORMOJ. Ni ofte ricevas leterojn petante diversajn informojn. Bonvolu direkti vin al la koncernaj delegitoj de U.E.A. kiuj jam estas organizitaj por tiu servo. Tamen, se vi deziras ion de ni, aldonu almenaŭ internacian respondkuponon.

S-ano Vaclav Burkert, Tanvald Ldar, Ĉeĥoslovakujo. Vi demandas, ĉu oni povas aboni nian gazeton ĉe Ĉeĥoslovaka Esperanto Asocio? Respondo: Ankorau ne organizis ni la aboneblecon en Europo pere de landaj organizoj. Tamen vi jam povas aboni rekte, sendante 15 internaciajn respondkuponojn en rekomendita letero al nia adreso. Jara abono. Salutojn.

S-ano Ralf Spilling, Halle Saale Pri abonebleco legu la supran respondon. En Paragvajo ni havas nek kontakton nek adreson. Ni ĝojas, ke plaĉas al vi nia modesta gazeto. Saluton.

V. Excia. já pensou em adquirir seu Calçado!

Não o faça sem primeiro fazer uma visita aos nossos mostruários e preços

CASA RAYON

RUA ARQUIAS CORDEIRO, 278

Fone 29-1359 (Meyer)

DR. ADOLPHO STAERKE
Livre docente da Universidade do Brasil
Clínica de senhoras

Residência:

RUA BELA S. LUIZ, 68 R. ASSEMBLÉIA, 58-1.º
Tel. 48-5892

Consultório:

R. ASSEMBLÉIA, 58-1.º
Tel. 42-3835

NIA KONKURSO

Kiel rezultato de nia konkurso, aperinta en la oktobra numero, ni prezentas nun la jenan decidon de la Juĝa Komitato, konsistinta el samideanoj Délio Pereira de Souza, Laszlo Zinner kaj Nelson Pereira de Souza.

- 1a.) S-ro Giovanni P. Faraco, urbo Florianópolis, ŝtato Santa Catarina. Premio: "Jarmiloj Pasas".
- 2a.) S-ro Alberto Flores, urbo Pôrto Alegre, ŝtato Rio Grande do Sul. Premio: "Riĉa kaj Sen Mono".
- 3a.) S-ro Sebastião Augusto, urbo Manaus, ŝtato Amazonas. Premio: "Kulio".

Ankaŭ sendis ekzaktajn respondojn, sed malpli detalajn, samideanoj Ivo Sanguinetti, el Pôrto Alegre, kaj Nerino Della Rosa, el Americana, ŝtato São Paulo; al ili S-ano Nelson donacas la libron "Tra l' Silento", de Edmond Privat. Al la ceteraj, kies respondoj en havas unu erareton (S-ro Walter Boppré, el Laguna, Santa Catarina; F-ino Emilia Muccilli, Rosario, Argentino; S-ro Sebastião A. Oliveira, Tanabi, São Paulo), S-ano Zinner donacas unu libreton de la serio "Esperanta Biblioteko Internacia".

RESPONDOJ DE SAMIDEANO FARACO

- 1 — Li naskiĝis en BYALISTOK (Bjelostoko), en la pola gubernio Grodno, Ruslando, je la 15a de decembro 1859a.
- 2 — Kiam aperis la unua Esperanta libro, D-ro Zamenhof alprenis la pseŭdonimon "D-ro Esperanto", tio estas, "doktoro, kiu esperas". "Lingvo de D-ro Esperanto" oni diradis tiam; poste oni mallongigis "Lingvo de Esperanto", "Lingvo Esperanto" kaj "Esperanto".
- 3 — La unua Esperanta libro aperis je la 14a de julio 1887a, en Varsovio, sub la titolo "INTERNACIA LINGVO" kaj subtitolo "Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro". Ĝi enhavis la moton "Por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia".
- 4 — La unua Esperanta gazeto nomiĝis "LA ESPERANTISTO". Ĝi aperis en septembro 1889a kaj estis fonidita de la unua esperantista societo, iama volapukista societo, gvidata de C. Schmidt.
- 5 — La Unua Universala Kongreso de Esperanto okazis de la 5a ĝis la 13a de aŭgusto 1905a, sub la prezido de A. Michaux kaj rektoro E. Boirac: ĝi aprobis la "Bulonjan Deklaracion". Okazis ĝi en la urbo Boulogne-sur-Mer. En tiu kongreso, D-ro Zamenhof finis sian paroladon per la fama "Preĝo sub la Verda Standardo".

* * *

Al ĉiuj ni elkore gratulas, kaj sciigas, ke en la venonta numero ni aperigos novan konkurson.

PALACE MÓVEIS

Exposição permanente de Móveis de fino gosto

P. M. RAWET & CIA. LTDA.

Pc. das Nações 184 — R. Cardoso de Moraes 506-A

Bonsucesso RIO DE JANEIRO Ramos

Enlandaj Novajoj

São Francisco do Sul (Ŝtato Santa Catarina). — Oni komunikis al ni la fondon de "La Esperanto Klubo EVERARDO BACKHEUSER" kiu funkcias en la salono de Biblioteko. Jen la nomoj de la estraranoj; Hon. prez.: P. Maria Augusta S. Thiago, Prezidanto: Gastão J. Pereira, 1-a seĝ: Ismário Bezerra. 2-a seĝ: Eurico Silveira, 1-a kasisto: Ary da Costa Pereira, 2-a kas: Gessy de Freitas kaj la estro de la Kultura Departemento S-ro Claurencio V. Caldeira. Niajn sincerajn Gratulojn al la nova Klubo.!

Torquato Severo (Ŝtato Rio Grande do Sul). — Ni ricevis la jenan leteron: Ni havas la plezuron sciigi Vin, ke la nova estraro de Esperanto Rondeto de Torquato Severo, por la sociaĵaro de 20-a de septembro de 1947-a ĝis la sama dato de 1948-a, konsistas el la jenaj samideanoj; Prez.: João Severo, Vic-prez.: Carlos S. Pereira. Sek.: Paulo Pülherme Neto, Helpsek.: Emílio Leal, Kasisto: Policarpo Severo kaj bibliotekistino S-ino Alba Alves. Jen kion skribas interalie la help-sekretario S-ro Leal: "Ni ekkaptas la okazon por certigi Vin, ke tiu ĉi estraro deziras streĉi la ligilojn de frateco kaj unueco kun Vi kaj la ceteraj gesamideanoj de Via Asocio..."

RIO ESPERANTISTA deziras fruktodonan lăboradon al la nova estraro.

Clube Esperantista de Niterói. — Ni ricevis la jenan leteron de S-ro Prezidanto, Mario Ritter Nunes:

"Senhores Diretores e demais membros da A.E.R.J.;

Temos o prazer de comunicar-lhes que foi fundado nesta cidade, capital do Estado do Rio de Janeiro, no dia 10 do mês próximo passado, o "Clube Esperantista de Niterói".

Seu principal escopo é chegar à mais estreita colaboração com todas as organizações do país e do mundo, para que se possa realizar um trabalho eficiente e digno da Interna Idéia do nosso mestre Zamenhof.

Niterói, pioneira do movimento esperantista entre nós, pois já em 1906 possuía o seu "Niterói Grupo" fundado pelos elementos do veterano "Brazila Klubo" do Rio de Janeiro, não podia ficar indiferente nesta época em que as melhores forças pró paz se arregimentam de todos os lados.

E', pois, com inconfundível júbilo que entramos em contato com os prezados co-idealistas, esperando merecer o apoio moral e material que muito necessitamos para o bom êxito da causa comum."

Jen la estraro de la Klubo: Prez.: D-ro Mario Ritter Nunes. Sek.: S-ro Otávio Vianna Peixoto, kasisto: Kolonelo Ivan Madeira Coelho.

Ni elkore gratulas la renaskiĝantan Klubon de Niterói!

Uberlândia Esperanto Klubo sciigas nin pri la novaj estraranoj por 1948. Jen la nomoj — Prezidanto: Milvar de Menezes, Vic-prez. Orozimbo Arantes, Unua Sek. Haroldo Leite Pinto; Dua Sek. Celia Vilela da Silva, Unua Kasisto: Mello Martins Costa, Dua Kas: Carlos Torido Leite, Bibl.: Aurora Antunes da Mota. Dir. Soc. Kaj Ekskurso: Afonso Iannicelli, Pri Instruado: Celia Vilela de Andrade, Pri Virinaj af: Elza Costa Pereira, Pri Sportoj: Omar Sebastião Cerqueira, Pri Propagando: Adair Peres Carvalho.

Konsilantaro: João Dorneles de Santos J-or, João Faria Godoy, Ivo de Oliveira, Sebastião Ribeiro dos Santos kaj Lourdes Carvalho.

Ni deziras bonsukceson.

"A FRUGAL" PENSÃO VEGETARIANA

Refeições saborosas, nutrientes e saudáveis, à base de frutas e hortaliças, cruas e cozidas.

Ambiente familiar. — Livros para consulta.

Direção de Edgard Carvalho de Mendonça, Secretário Geral da Sociedade Naturista do Brasil

RUA DO CARMO N.º 24 — Tel. 22-5366 — RIO (Fundos da frutaria)

Local em adaptação

Rio Esperantista

Orgão oficial da A E R J.

PENSAMENTO E TRABALHO PELA FRATERNIDADE UNIVERSAL

Diretor: Nelson Pereira de Souza

Redator-Chefe: László Zinner

Assinaturas:

Brasil — Cr\$ 20,00
Exterior — U\$ 1,50
Ou 15 Coupões-resposta
Avulso — Cr\$ 2,00

Rio de Janeiro, Fevereiro de 1948

ANO II — Edição mensal — N.º 11

Enderêço: Caixa Postal 3677

Redação e administração
Rua das Marrecas, 19, 2.º and

Telefone 22-5300

celoj kiujn li ĉiam persekvus per longaj abstinencoj kaj pacaj admonoj al ĉiuj siaj samlandanoj.

Kvazaŭ esperantisto, li pace avertis la malpacemulojn, al ĉiuj konsilis kaj paceme persistis je sia laborado, kiu, kvankam ĝi povas ŝajni stranga kaj malsimila, estis tamen esperantista idealo adaptita al la cirkonstarcoj de tiu orienta lando.

Nevole oni ekmemoras la mortigon de Cezaro, en anti-

Cêrca de 150 Esperantistas Denove Oni Ekpafis... Visitaram "o Séclo"



Cêrca de 150 sócios da Liga Esperantista Portuguesa, acompanhados dos diretores, sras. D. Alda Maia Henrique, D. Maria Manuela Teixeira Lopes, D. Isabel Vieira e srs. comandante Carlos Henrique, Walter Sacramento, João Frazão de Faria, Armando Cunha e Americo Geraldo dos Santos, visitaram "O Séclo". O sr. Werter Sacramento, em nome da direção referiu-se, em termos elogiosos, à ação deste jornal em prol do povo e das crian-

ças desprotegidas, criando, em S. Pedro do Estoril, o que classificou de "grande e formidável obra filantrópica" que é a Colonia Balnear Infantil. O sr. Armando Cunha recordou, a seguir, a visita que os esperantistas portugueses fizeram, o ano passado, àquela Colonia, às crianças belgas que ali estiveram a retemperar a sua abalada saúde. No final, os visitantes entregaram 200\$00 para a Colonia Balnear Infantil.

La mortigo ĉiam estis kaj estas la plej grava kaj terura krimo antaŭ nia propra konscienco. Kaj inter tiuspecaj krimoj la plej abomenindaj estas, senduble, en ĉiuj epokoj kaj en ĉiuj landoj, mortigoj de la infanoj kaj de la gemaljunuloj.

Jen kial ni, civilizitaj homoj, devas altoĉe proklamiĝi abomenegon rilate al la mortigo de maljuna Gandhi, eminenta okdekjaraĝa pensulo de Hindujo, ĉar tiu krimo malpurigis nin kaj nian "civilizitan dudekan jarcenton" per granda makulo kiu longe restados sur ni.

Krom ĉiuj aliaj konsideroj, ni konsideru nur la fakton, ke iu malsaĝa aŭ subaĉetita individuo (al ni estas tute egale kiuj ajn estu la motivoj de tiu krimo) perforte aŭ ruze, dum grandnombra publika preĝado, ĉesigis la vivon de tiu viro fama, konata kaj estimata tra la tuta mondo, kiu jam delonge kaj pace sopiregis emancipadon de sia popolo, rajton por ĝi vivi sendepende, pace kaj inde en komunumo kun ceteraj popoloj,

kva Romo, kaj eĉ pli fruan mortigon, en glora Grekujo, de la saĝa kaj ĝis ekstremo tolerema Sokrato, kaj, rigardante malantaŭen tra la distanco de jarmiloj, ni povas nur diri: "Vere, vere, malgraŭ tio ke ni ne estas pesimistoj, ni ja devas konkludi; kiom malmulte la homaro progresis morale kaj spirite dum teknike kaj el la vidpunkto materialista ĝi jam posedas eĉ la atombombon."

Per morto de Gandhi ni, esperantistoj, perdas kunlaboraton kaj samideanon ĉar, kvankam oni povus lin nomi kiel malmodernulo, li, kiel vera apostolo de paca progreso kaj emancipado, ankaŭ laboris kun la celo identa al la nia — efektiviĝi pacon kaj amon inter la homoj.

Tiaj estas la konsideroj pro kiuj ni, laŭ nia modesta opinio, devas memori kaj honoriti tiun vere grandan viron, dezirante, sincere kaj elkore, pacon kaj progreson al lia animo.

KOBO

SCIIGOJ PRI LA 33-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MALMÖ. SVEDUJO, 1948. — La loka Komitato de la Kongreso sciigas nin pri la jenaj novaĵoj:

En la monatoj januaro ĝis julio, 1948, la Loka Kongresa Komitato de la 33-a Universala Kongreso de Esperanto, en Malmö, okazigos radiodisaŭdigojn la unuan dimanĉon ĉiumonate pere de kiuj ni donos informojn pri la Kongreso kaj ĝiaj aranĝoj. La disaŭdigoj do okazos dimanĉe la 4-an de januaro, la 1-an de februaro, la 7-an de marto, la 4-an de aprilo, la 2-an de majo, la 6-an de junio kaj la 4-an de julio ĉiufoje je la 15.00 ĝis 15.15 horo laŭ Greenwich tempo, en mallongaj ondoj de 19.80 m. kaj 27.83 m. Raportojn danke akceptas la 33-a Universala Kongreso de Esperanto, Malmö, Svedujo.

Ĝis la 28-a de novembro aliĝis jam 250 kongresanoj.

NOVA ESTRARO DE ESPERANTO KLUBO EN SÃO PAULO

Jen la nomoj de la novelektitaj estranoj de tiu Klubo: Prezidanto — S-ro Newton Ceratti, vic-prez. — D-ro Hilário Deantonio, gen. sek. — S-ro René Ventura Salles (reelektita), unua sek. — S-ro Rubens Ariza Martin, dua sek. — S-ro Amelia Levy, kasistino — D-ro Azalis Machado Dias (reelektita), help-kasistino — F-ro Astrogilda Guerrini, direktoro pri propagando kaj kulturo — S-ro José Regenati (reelektita), direktorino pri ekskursoj — F-ro Vallivia Riemma.

Ni ege bedaŭras ne plu vidi la nomon de S-ro Osvaldo Leite MORAIS inter la membroj de estraro.

Nia Asocio deziras plensukcesan laboron al la novelektitaj estraranoj dum la jaro 1948.